// La Hodiaŭa Ĵurnalo

2018-01-01 n-ro 403

# Cisjordanio: Ahed Tamimi fariĝis simbolo de la palestina afero



Aluminio, kiun vi ne konas

Por eviti ĝenadon al bestoj urbo uzos artfajraĵojn sen sona efekto je novjara festo

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**
Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro
kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉënkin [Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**
hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

Farita per: Scribus Open Source Desktop Publishing

## Cisjordanio: Ahed Tamimi fariĝis simbolo de la palestina afero
*La adoleskantino estis arestita la 19-an de decembro p. 03*

## Aluminio, kiun vi ne konas
*Por akiri unu kilogramon da aluminio el la roko nomata baŭksito, oni nemalfote bezonas preskaŭ 100 kilovatohorojn p. 04*

## Por eviti ĝenadon al bestoj urbo uzos artfajraĵojn sen sona efekto je novjara festo
*Brazila urbo Ponta-Groso p. 05*

## Hodiaŭe
*Branko Ćopić; Sándor Petőfi; kaj Barato p. 06*



# Cisjordanio: Ahed Tamimi fariĝis simbolo de la palestina afero

La deteno de Ahed Tamimi estis plilongigita je kelkaj tagoj fare de la Israela milita justico. Tiu juna palestinanino, 16-jaraĝa, aperos denove ĉe tribunalo por decidi, ĉu ŝi estos persekutata aŭ ne. La adoleskantino estis arestita la 19-an de decembro, ĉar ŝi vangofrapis kaj batis perpiede du soldatojn, kiuj troviĝis en ŝia vilaĝo de Cisjordanio, Nabi Salih. En daŭro de kelkaj tagoj, ŝi fariĝis reprezentantino de la lukto kontraŭ la israela okupacio.

En la sociaj retoj, kelkaj retanoj anstataŭigis siajn fotojn per la portreto de la adoleskantino, strekita kun la skribaĵo «Liberigu Ahed». La prezidento de la Palestina aŭtoritato siaflanke, vokis la patron de la junulino. Sed la subteno al Ahed Tamimi ne limiĝas al la Palestinaj teritorioj. Ĝi estas internacia, ĉar ŝia lukto estas signifoplena, opinias Bassem Tamimi, ŝia patro. «Ŝi simbole vangofrapis la okupacion. Tio kuraĝigis, motivigis kaj inspiris la homojn en la tuta mondo: ĉiujn batalantojn por libereco, kiuj kredas je la homaj rajtoj».

16-jara, Ahed Tamimi ne plenumis tiam sian unuan rimarkindan agon. Kiam ŝi estis 12-jara, ŝi jam aperis en video, minacante soldaton per la pugno. «Ŝi havas konvinkon. Ŝi konsideras, ke tiu tero estas palestina, ke ni devas batali. Ŝi pretas oferi sin, kaj pro tio aperas kiel fortika junulino».

Ahed Tamimi estas hodiaŭ unu el la vizaĝoj de la palestina afero.

Ŝiaj mallaŭdantoj substrekas, ke tiu alvokiĝo estas deviga. Laŭ ili, ŝiaj gepatroj – engaĝiĝintaj en la lukto kontraŭ la okupacio – utiligas ŝin por apogi sian batalon.

Neniam Milito Inter Ni

# Aluminio, kiun vi ne konas

Ĉu vi scias, ke por elfari unu ladan skatolon por trinkaĵo, estas necese uzi tiom da elektra energio, kiom sufiĉus por unu homo, por ke tiu povu dum unu monato bani sin en varma akvo? Laŭ la premiso, ke unu persono prenas duŝon dum 2 minutoj tage sub 2-kilovata elektra varmigilo, dum unu monato ni jam havas unu horon da banado.



Tio ŝajnas esti neeblaĵo, ĉar tia aluminiskatolo kostas groŝojn, dum elektro ne estas malmultekosta. Do se estus tiel, ĉi tiu ujo devus kosti multe pli – vi ekpensus. Sed evidentiĝas, ke por akiri unu kilogramon da aluminio el la roko nomata baŭksito, oni nemalfote bezonas preskaŭ 100 kilovatohorojn. Kompareble unu kilogramo da fero estas akirebla dank' al apenaŭ 5 kilovatohoroj.

Nur baŭksito (boksito) entenas tian amasigon da aluminio, ke ĝia akirado estiĝas senca. La roko troviĝas en diversaj lokoj de nia terglobo, sed la plej bona kaj plej malprofunde trovebla estas en la pluvarbaroj de la norda Brazilo. La plej profitdona minejo de baŭksito troviĝas proksime al la biologia naturrezervejo de la rivero *Trombetas*. Por ricevi el baŭksito aluminioksidon oni devas prilabori ĉi materialon en la solvaĵo de sodo kaŭstika, kiu fariĝas sekve unu el plej acidmordaj substancoj en la mondo. La forĵetaĵo de la substanco - la ruĝa ŝlimo, en la lokoj de ĝia forĵetado estingas ĉiuspecan vivon por dekoj aŭ eĉ por centoj da jaroj. En kelkaj landoj ĝi estas forkondukata eĉ rekte en riverojn. Kelkfoje ĝi falas tien rezulte de averioj, kiel ekzemple en Hungario en 2010, kie okazis unu el plej grandaj medikatastrofoj en la historio de Eŭropo.

Tiamaniere ricevita aluminioksigeno transportata estas al fornoj, kie ĝi estas subigata al elektrolizo. Ĉi procezo estas nomata Hall-Heroult-procezo, kaj ĝi postulas neimageble grandajn kvantojn da energio. Fandejoj de aluminio plej ofte estas situitaj proksime de elektrejoj, por ŝpari la transsend-energion. La produktado de aluminio estas profitdona nur tiam, kiam konzerno ricevos ege favoran tarifon por kurentenergio.

Aluminikonzernoj minacas al registaroj, ke se ili ne ricevos la favorprezan energion, ili translokiĝos al malriĉaj landoj, kiuj estos pli favoraj por ilia agado. La produktado de aluminio eluzas 1% da tuta energio produktata en la mondo.

Averaĝaj konsumantoj de kurento pagas do tro grandajn tarifojn, por ke la kostoj de la produktado de aluminio estu malaltaj. Precipe tio estas rimarkebla en Germanio, kie la tuta popolo krompagas

tiucele, ke konzernoj povu produkti aŭtomobilojn kun granda nombro da aluminipartoj favorpreze. Sed bedaŭrinde, kiam ni krompagas la aluminiproduktadon, ni kunhelpas nian propran ruinon.

Finiĝas la stranga laŭ mi jaro 2017. Estis la jaro, kiam malfermiĝis al mi la okuloj je multaj, kvazaŭ nevideblaj pli frue, gravaj aferoj, kiuj ĉiutage okazas ekster nia vido. Kelkaj el vi konstatos, ke eble ne valoras penon okupiĝi pri tio, kio ŝajne estas neevitebla. Sed mi kontraŭe opinias, ke valoras. Ni unue bezonas la konscion de iu problemo kaj sekve, uzante nian kapablon pensi, ni povas iel kontraŭagi. Ni, kiel la loĝantoj de la mondo, ja estas ĝia plimulto, ni do rajtas decidi pri nia propra sorto, anstataŭ faru ĉi tion apenaŭ kelkaj unuoj, ĉi-momente iom pli bonstataj ol ni. Sekvante do ĉi-optimismigan ideon, mi hodiaŭ komencas la prezentadon de iu problemo, pri kiu eble ankaŭ vi ĝis nun ne meditis. Mi ankaŭ volas bondeziri al vi sojle de la Nova Jaro 2018-a, kiu por ni ĉiuj fariĝu la tempo de pluraj venkoj super ĉiuj malfortoj kaj eraroj, ke ĉiutage por ni ĉiuj brilu klare la suno, ke nia ĉielo estu ĉiam pura kaj plena de freŝa aero, kaj ke similaj estu niaj pensoj la tutan jaron kaj poste.

Andreo Bach
Esperanta Retradio

---

# Por eviti ĝenadon al bestoj urbo uzos artfajraĵojn sen sona efekto je novjara festo

En la brazila urbo Ponta-Groso, subŝtato Paranao, la urbodomo decidis aranĝi novjaran eventon kies eksplodaĵoj miksos efektojn luma kaj fuma, sed ne sona. Ĝi okazos dimanĉe la 31-an de decembro en “Parko de la Medio”, kaj per tiu ago la urbodomo celas mildigi al hejmbestoj la ĝenon fare de la sona efekto de artfajraĵoj je la noktomezo.




La aŭdkapablo de hundoj kaj katoj estas pli sentema ol aŭdkapablo ĉe homoj. Tiu bruego de eksplodaĵoj havigas al ili streĉiĝon, vundon dum rifuĝado kaj eĉ vomadon kaj lakson, pro korpa varmigo.

Karine Raile, kiu estas bestkuracisto konsilas, ke prefere oni ne lasu sole la beston dum tempodaŭro de fajropafado, fermu pordojn kaj fenestrojn por iom bari la eksteran sonon, havigu agrablan ĉirkaŭan sonon, kaŝu vundigajn objektojn kaj ne enmetu kolzonon.

Laŭ la urbodomo, tian “silentan” fajropafon sponsoros la entreprenoj.

Paulo Cesar Pires
esperanto.blog



## Branko Ćopić

**Branko Ćopić (serbe Бранко Ћопић [brǎːnkɔ͡ tɕɔ̂pitɕ]; naskiĝis la 1-an de januaro 1915 en *Haŝani*, *Bosanska Krupa*; mortis la 26-an de marto 1984 en Beogrado) estis serba verkisto el Bosnio.**

**En Esperanto aperis: *La legindaj partizanoj; La caro en Bekez; Tombo en kritiko-kampo; Eta mia el Krupa Bosnia.***

**Vikipedio**

---

## Sándor Petőfi



**Sándor Petőfi [ŜANdor PEtefi] (naskiĝis la 1-an de januaro 1823 aŭ la 31-an de decembro 1822, mortis la 31-an de julio 1849?) estis la pseŭdonimo de Sándor Petrovics, hungara nacia heroo kaj poeto.**

**En Esperanto aperis: *La avo; Hungara poemaro II; Johano la Brava; Johano la Brava.***

**Vikipedio**

---



## Bildo de la tago

***Acridotheres ginginianus*, Barato.**

**Vikipedio**